

PREZO: 1:— Kr.

Staretr. AB. Stlm 1950

MALGRANDA REVUO

Nro 1 · 1950
8a JARO

ENHAVO:

	Paĝo
Pensoj pri etiko, de L. C. Dej.....	1
Kon-Tiki kaj la polinezia problemo, de Thor Heyerdahl	3
La spirita mondo, de prof. Porto Carreiro Neto	14
Komentoj	18
Literaturo	23
Kie oni malhelpas esperanton	28
Poemoj de L. C. Dej.....	30

Redaktoro — Eldonanto:
STELLAN ENGHOLM, HAGGE, SVEDUJO

MALGRANDA REVUO

aperas dumonate. Prezo 1 kr. (inkl. sendkoston). Jarabono 6 kr. Unuopa ekz. al eksterlando kontraŭ 3 rpk. — S. Engholm, Box 205, Hagge, Svedujo. Poŝta ĝirokonto 26 80 23. MR ne aperigas anoncojn aŭ informojn.

Nemenditaj manuskriptoj estas resendataj nur se akompanas ilin afranko por resendado.

Perantoj

Aŭstrio: Eldonejo "Tramondo", Neutorgasse 9, Wien I.

Belgujo: Flandra Esperanto-Instituto, P. van Humbeekstr. 3, Brusel W.

Brazilo: Sro Jozefo Joels, Caixa Postal 2 — Lapa, Rio de Janeiro.

Britujo: Libroservo de UEA, Heronsgate, Rickmansworth (Herts).

Ceĥoslovakio: Esperanto-Asocio en CSR, Uralské nám. 9, Praha.

Danujo: Libroservo de CDEL, Pr. Jørgensgade 4 A, Kopenhago N.

Finnlando: Eldono Vilho Setälä, Onnentie 23, Helsinki Kä.

Francujo: Unuiĝo Esperantista de Francujo, 34 rue de Chabrol, Paris X.

Germanujo: Dr. Siegfried Ziegler Verlag, Engelbertstrasse 7, (13 b) München-Pasing.

Italujo: Sro Leo Costantini, Piazza Lagosta 2, Milano.

Nederlando: Libroservo FLE, Roelantstr. 4, Amsterdam W.

Palestino: Sro J. Kohen-Cedek, P. O. B. 7015, Jerusalema.

Polujo: R. Sakowicz, Parafialna 3, Nova Sól.

Svisujo: Sro O. Walder, Eigenheim, Romanshorn.

Usono: Libroservo de American Esperantist, 114 W. 16 St. New York 11.

MALGRANDA REVUO

Nro 1

8a JARO

1950

Pensoj pri etiko

De L. C. DEIJ

Kompreni la formulon "Double du faras kvar" ne sufiĉas por solvi matematikajn problemojn. Kompreni la principon "Agu kun aliaj tiel, kiel vi deziras, ke aliaj agu kun vi!" neniom sufiĉas por solvi kontentige la tre multajn problemojn de moralo kaj etiko. Pensi racie kaj senti morale oni devas *lerni* kun multe da energiuzado. Iuj homoj havas precipan inklinon al logiko (Lanti); aliaj havas precipan moralinklinon, mi ŝatus diri moralintalenton (Zamenhof).

Sed ankaŭ talentojn oni devas kulturi. Sekve neniu evitos seriozan studadon, kaj al infanoj (same ankaŭ al simplaj homoj) oni devas instrui moralon. Tamen la moderna tempo postulas antaŭ ĉio kapablon por logiko.

Neniu povas fini la lernejon sen la rutino skribi kaj kalkuli. Sed oni povas fini ĉe universitaton sen kompreno por la scienca en la homo vivo, sen kontentiga moralsento. Nuntempe estas preskaŭ hontige neniom scii pri atomenergio, radaro kaj arta insemo (inseminacio), sed ŝajnas preskaŭ superflue (se ne ridinde eksmode) studi etikon. Tio estas tiom pli miriga, ĉar la nesolvita demando "Kia estas la homo kaj kiel li vivu?" (Platon) neniam estis tiom aktuala kiom ĝuste nun en nia reforma epoko.

Ĉiu tempo havas siajn normojn. Oni devas juĝi la etikon de malnovaj tempoj ne laŭ instruoj de iu Hegel aŭ Kant. Propran etikon bezonas ankaŭ la nuna tempo. Ŝajne nia teknika mondo konsistas el nur ciferoj kaj formuloj. Interne kaj esence ĝi konsistas el pensoj kaj ideoj. Kaj la homo, kiu volas reformi la plej ĝeneralan teorion, la validan normon ne nur pri pensado sed ĉe pri politiko kaj ekonomio, volas fari scienca etikan re-

formon; li volas ŝanĝi la validajn konceptojn pri bono kaj malbono, pri "tolerebla" kaj "netolerebla". Pro tio li devas havi ankaŭ etikan prudenton; li devas koni la esencon kaj de la nova teorio kaj de la malnova normo. Estante mem preskaŭ radikala mi riskas diri mian penson iom pli krude: ĉiu reformisto, ĉiu "progresema" homo sen etika respondosento esence estas fuŝulo.

Kiel oni povas lerni etikon? Utile estas studi literaturon kaj historion. La libroj donas ĉiujn homajn pensojn kaj sentojn. La historio rakontas pri la vivo de ... normoj kaj ideoj. Sed studo ofte kondukas al danĝera sistemigo. Oni povas legi Sep Fratojn sen kompreni, ke temas pri finna (kaj samtempe unika) prezentmaniero de universala problemo: la esenco de bona vivo (tio estas etiko!) kaj la neceso celadi al ĝi. Same oni povas legi la Leterojn de Zamenhof sen rimarki, ke granda parto — almenaŭ interne — staras en rekta rilato al la etika racio de unu tre granda moralisto. Kaj oni povas eble fariĝi profesoro de historio sen iam malkovri la profunde homajn tragediojn sur la tedaj paĝoj pri diplomaciaj kaj politikaj konfliktoj.

Aparte gravaj por la studanto de etiko estas humanismo kaj religioj. Kredeble ĉiu moralserĉa leganto iam meditis pri la ekzisto, la homa spirito aŭ la "summum bonum". Tiujn demandojn traktas ankaŭ la grandaj filozofiaj kaj religiaj instruantoj, kaj mi kredas, ke iliaj respondoj devas interesi almenaŭ la seriozan reformiston. Pli ol studado pri tekniko kaj logikaj sciencoj la meditado pri la vivosenco donas komprenon pri fortoj kaj problemoj ekster la propra pensmedio. Ĝi donas tian "perspektivosenton", kiu ebligas al pensema homo distingi esencajn aferojn de apudaj, eternajn normojn de okazaj. Sen tia perspektivosento, sen perspektivkapablo kaj rekono de aferoj pli gravaj ol la niaj (!) neniu reformo alportos veran progreson.

Preterpase mi volus memori pri unu ekzemplo de grandioza perspektivkapablo. Ni trovas ĝin en antikva, miniatura dokumento: la Dek Vortoj. Nuntempe oni konas ĝin pli ofte sub la nomo la Dek Ordonoj, kvankam la originala lingvo ne pravigas

tian tradukon. Granda parto konsistas el malpermesoj, kaj etikaj malpermesoj (ni trovas ilin ankaŭ ĉe Kant) estas necesaj en socio, kie la homo dependas de homoj. Sed tio estas apuda afero. La Dek Vortoj (nur 620 literoj!) donas kompletan etikan instruon validan por ĉiuj tempoj, ĉiuj landoj, ĉiuj homoj. Tridek du jarcentoj da kulturo apenaŭ povis aldoni ion esencan.

Sublima estas ankaŭ la malnova, juda penso, laŭ kiu la revelacio okazis en la dezerto, en loko libera por ĉiuj. Neniu popolo povas pretendi, ke en ĝia regiono estis iam proklamata la universala leĝo.

Historie tre grava estas la monoteismo en la Dek Vortoj. La antikva mondo tute ne konis ĝin, kaj eĉ nuntempe tre multaj kristanoj estas spirite ne sufiĉe maturaj kompreni ĝian esencon. Precipe dum la lastaj militoj multaj kondutis, kvazaŭ ekzistus aparta Dio por ĉiu aparta lando! Historie la monoteismo kondukis al monoantropismo; pli simple: la rekono de universala Dio kondukis al la rekono de universala homo sen distingo laŭ raso, nacio aŭ deveno.

Kon-Tiki kaj la polinezia problemo

De THOR HEYERDAHL

En nro 3 1948 de MIR troviĝis artikolo de Brendon Clark: "De kie venis la polinezianoj?". En tiu valora kaj interesa artikolo estis menciata ankaŭ la ekspedicio de la norvega scienculo Thor Heyerdahl. Kiel komplemento al tiu artikolo sekvas tie ĉi artikolo de Heyerdahl mem pri la polinezia problemo.

Kiam Leif Eriksson kaj liaj vikingoj, kaj poste Kolumbo kaj la hispanoj, kiel unuaj transiris Atlanton kaj malkovris Amerikon, ili kun miro trovis, ke la tuta Nova Mondo jam estas malkovrita kaj dense loĝata de tre diversaj popolgrupoj, kiuj nuntempe estas konataj sub la komuna nomo indianoj.

Iuj el tiuj indianoj havis altnivelajn kultursociojn, konstruis

urbojn kaj vojojn, starigis piramidojn kaj monumentojn, sciis legi kaj skribi per bildskribo, ili havis astronomian scion kaj kalendaran sistemon, kiuj estis plene samnivelaj kun la tiamaj en Eŭropo, kaj la kuracarto en iuj lokoj estis tiom evoluinta, ke oni faris trepanon, ĥirurgian operacion en la kranio.


Sed neniu el tiuj novtrovitaj amerikaj indianokulturoj ŝajnis posedi tion, kion ni en Eŭropo nomas ŝipojn aŭ verajn boatojn. Ĉe la nordokcidentaj indianoj kaj en Meza Ameriko troviĝis grandaj martaŭgaj kanotoj, kaj en Sudameriko la inkaindianoj havis flosojn el balzaligno, ekipitaj per veloj kaj drivtabuloj,* kiujn ili uzis, kiam ili fiŝis en la Humboldtfluo kaj kiam ili transportis sekigitan fiŝon kaj aliajn komercaĵojn supren kaj malsupren laŭ la dezerta marbordo de Peruo. La hispanoj miris, trovante ke iuj el tiuj martaŭgaj balzaflosoj estas pli grandaj ol iliaj propraj karaveloj kaj povas porti 50 homojn kaj 3 ĉevalojn. Sed kvankam ili renkontis tiujn grandajn trunkflosojn meze en la Humboldtfluo, 50 marmejlojn de la bordo, ili tamen ne povis imagi, ke tiaj flosoj taŭgas por transiri oceanojn.

Sed la hispanoj mem nur atingis la marbordon de Peruo, kiam ili tuj forlasis la inkaregnon kun ĝiaj balzaflosoj kaj kun la trado* rekte aldorse transvelis la tutan Pacifikon.

Tio meritas atenton, ke kvankam Marko Polo kaj aliaj antaŭaj marveturantoj el la mezaraj landoj antaŭ longe malkovris la Malajajn insulojn kaj la pacifikan bordon de Azio, ĉiuj oceaninsuloj en Pacifiko tamen restis nekonataj al la cetera mondo, ĝis Ameriko estis trovita. Nur kiam nia propra raso atingis la pacifikan bordon de Sudameriko, la tuta Pacifiko estis malfermata por la cetera mondo. Polinezio, Melanezio, Aŭstralio, ja eĉ la Mikroneziaj insuloj tuj ĉe la bordo de Azio estis malkovrataj ne de Azio kaj de okcidento; ili restis nekonataj al la azianoj kaj nia mondparto, ĝis la hispanoj transiris Atlanton kaj poste la terkolon de Meza Ameriko, atingis la bordon de Peruo kaj tiel povis profiti de la fortaj kaj kon-

* Tabuloj fiksataj sub floso aŭ senkila boato por malhelpi drivadon.

* Konstanta tropika vento de oriento al okcidento.



Kon-Tiki proksimiĝas al sia celo.

stantaj vento kaj fluo, kiuj en tiu tropika maro ĉiam puŝas de oriente.

Tio estas fakto, kiun nia propra raso estis forgesinta, kiam aperis la problemo pri la popolgrupoj, kiuj jam antaŭe loĝis sur la insuloj en la mezo de Pacifiko. Ankaŭ tie ĉi oni trovis strangan kulturpopolojn, kiuj konstruis piramidojn kaj kolosajn monumentojn, kiuj povis fari trepanon de la kranio, havis lignoplatojn ornamitajn per antaŭ longe forgesita bildskribo, povis diferencigi planedojn de steloj kaj kontentige dividis la tempon en jarojn kaj monatojn. Oni ankaŭ tuj konstatis, ke la batatoj, kiuj tiam kreskis nur en Ameriko, estis kulturataj sur ĉiuj tiuj insuloj en la orienta parto de Pacifiko. La batatoj, kiuj cetero estas hejme ĉe la grandaj indianokulturoj en Meza Ameriko kaj Peruo, estis ekz. unu el la plej gravaj kulturplantoj ankaŭ sur la pacifikaj insuloj, kiuj kuŝas plej proksime al Peruo, kaj la indiĝenoj sur Paskinsulo, Hawaii, Tahiti kaj ĉiuj aliaj insuloj nomis la batatojn *kumara*, kaj tio estas ĝuste la sama nomo kiun ĝi havis ĉe la indianoj en norda Peruo.

Dum la paso de la jaroj diversaj sciencistoj el ĉiuj partoj de

la mondo en diversaj fakoj atentigis pri ĉiam novaj, apartaj kulturelementoj kiuj montriĝis komunaj por la antaŭhistoriaj kulturpopoloj en Peruo kaj la tre aparte loĝantaj insulanoj sur la pacifikaj insuloj inter Sudameriko kaj Aŭstralio. Post mia propra interesiĝo pri tiu problemo, mi kolektis pli ol okdek tiajn elementojn, kiuj ĉiuj indikas, ke ekzistis kontakto kaj interŝanĝo inter la plej malnovaj kulturpopoloj en Peruo kaj la insulanoj en Pacifiko. Mi estas ne la unua, kiu suspektis tion. Dum la paso de la tempo multaj esploristoj venis al tiu penso, sed la samaj argumentoj ĉiam faligis ĉiujn teoriojn. La Polineziaj insuloj kuŝas milojn da kilometroj de la plej proksima kontinento, neniuj aliaj homrasoj en la mondo estas tiel komplete izolitaj de la ĉirkaŭmondo, kaj tial estis tute klare, ke tiu prahistoria popolo, kiu forlasis kontinenton kaj ekloĝis tie ĉi en la maro, devis posedi vere martaŭgajn akvoveturilojn. Ĉu oni unue drivis for laŭ vento kaj fluo, ĉu oni laŭvole velveturis kontraŭvente trans la maron, oni jam antaŭ la forveturo devis havi akvoveturilojn, kiuj taŭgis por vera oceana vojaĝo. Kvankam la polineziaj insuloj kuŝas multe pli proksime al Ameriko ol al Azio, kaj kvankam la tradoj kaj la Humboldt-fluo dum la tuta jaro kondukas de Ameriko al la pacifikaj insuloj kaj de tiuj insuloj al Azio, neniuj tamen kuraĝis aserti, ke la grandaj antikvaj kulturoj en Ameriko povis transporti batatojn kaj kulturelementojn en Pacifikon. La inkaindianoj kaj iliaj malaperintaj antaŭuloj pruvis, ke ili estas grandaj inĝenieroj, konstruante milkilometrajn vojojn kun tuneloj kaj kolosaj pendpontoj. Ili transportis kaj manovris longdistance ŝtonblokojn, kiuj estis ĝis 12 metrojn longaj kaj ofte pezis ĉiu 40-50 tunojn. Sed surmare ili evoluis nur ĝis uzado de flosoj. Por eŭropano "flosa" estas la plej primitiva kaj netaŭga el ĉiuj akvoveturiloj. Kvankam la unuaj hispanoj bone priskribis tiujn flosojn kaj kvankam ili klareprime rakontas, ke la bordindianoj en la inkatempo estis tre taŭgaj maristoj, la vorto floso sufiĉis por igi la sciencan de postaj tempoj kredi, ke la grandaj kulturpopoloj de Sudameriko ne eltrovis iun ŝiptipon kaj ke ili tial estis tute detranĉitaj de surmara veturado. Oni supozis, ke kunligita balzafloso estis akvoveturilo ankoraŭ pli primitiva kaj neevoluinta ol elkavigita ligna kanoto, kaj tial

kaj historiistoj kaj arkeologoj kun miro devis konstati, ke la balzaflosoj de Sudameriko estis la solaj akvoveturiloj en Ameriko, kiuj pruveble veturis kaj per veloj kaj per drivtabuloj longe antaŭ ol Kolumbo venis al Ameriko.

En ĉiuj antropologiaj kaj botanikaj debatoj pri la eblo por prahistoria kontakto inter Sudameriko kaj la pacifikaj insuloj, la sciencistoj dividis sin en du partiojn. Ambaŭ samopiniis pri tio, ke la kulturpopoloj de Sudameriko ne povis atingi la pacifikajn insulojn, ĉar ili eltrovis neniujn marveturilojn krom balzaflosoj. Unu partio asertis tamen, ke estis tiom da similecoj inter la insulanoj kaj la kulturpopoloj en Sudameriko, ke la insulanoj verŝajne transveturis al la amerika kontinento kaj influis la lokan kulturon. La alia kaj pli forta grupo de sciencistoj pruvis, ke ĉiuj kulturtraĵoj komunaj por la du regionoj estis pli fruaj en Ameriko ol sur la insuloj, kaj oni povis en Ameriko sekvi gradan kaj lokan evoluon de la kulturo, dum la kulturo sur la insuloj komenciĝas subite kaj tute sen antaŭsignoj tiel malfrue kiel 500 jarojn post Kristo. La botanikistoj krome povis pruvi, ke la batatoj estis transportitaj ne de la insuloj al Peruo sed en kontraŭa direkto, ĉar ĝi evoluis de sovaĝaj specoj, kiuj troviĝas nur en Ameriko.

La problemoj pri la kulturo sur la Sudmaraj insuloj tial restis nesolvita. Oni povis montri eĉ ne unu solan regionon laŭ la bordo de Azio aŭ sur la Malajaj insuloj, kie la polinezia raso pruveble lasis spurojn, kiuj montris, ke tie estis la origina hejmloko de iliaj prapatroj. Oni ne povis klarigi, kiel la polinezianoj navigis de nekonata loko en Azio ĉirkaŭ tuta Aŭstralio, Nova Gvineo kaj la Melaneziaj insuloj por ekloĝi nur sur la insuloj plej proksime al Ameriko. Kaj oni ne povis klarigi la multajn kunligojn inter la polineziaj insulanoj kaj la loĝantoj en la prahistoria Peruo. Oni ankaŭ ne povis klarigi, kial tiom multaj el la insulanoj en Polinezio daŭrigis konstrui marveturajn flosojn, kvankam ili havis duoblajn kanotojn. Sur la insulo Mangarewa apud Paskinsulo la loĝantoj ne konis eĉ la nocion kanoto, ilia sola formo de martaŭga akvoveturilo estis grandaj kunligitaj trunkoflosoj kun veloj.

Profunde studinte tiujn problemojn post miaj unuaj elfosoj sur la Sudmaraj insuloj 1937 mi venis al la konkludo, ke se la

fakuloj, kiuj kondamnis la balzaflosojn, faris tion sur eraraj kaj neteneblaj premisoj, la tuta problemo aspektas alie, kaj oni devus rigardi la aferon laŭ tute nova perspektivo.

Tial mi kreis la Kon-Tiki-ekspedicion en 1947 por esplori la kvaliton de la balzafloso kaj por akiri decidan respondon pri la problemo, ĉu la prahistoriaj popoloj de Peruo vere estis tute neevoluintaj en navigado, tiel ke ili estas tute ne atentindaj, kiam oni serĉas ĉirkaŭloĝantajn popolojn, kiuj estus povintaj atingi la pacifikajn insulojn.

Montriĝis, ke la eltrovintoj kaj konstruintoj de la prahistoriaj balzaflosoj de Sudameriko solvis problemojn, kiujn neniu aliaj antikvaj kulturoj kapablis solvi. La balzafloso estis nesuperebla kiel mara akvoveturilo. Kiel korko la malpezaj balzatrunkoj en la flosa naĝis sur la plej grandaj ondoj. Eĉ kiam ni dum kvin tagnoktoj estis ĉirkaŭjetataj en frakasa ventego, la flosa ĉiam estis sur la supro de la ondoj, kaj se la akvoamasoj jetis sin sur la floson, ili en la posta sekundo malaperis inter la trunkoj aŭ trans la randon de la flosa. Balzafloso ne povas pleniĝi de akvo kaj subakviĝi kiel boato. Ĝi ne povas ekhavi danĝeran truon kaj perei. Se oni konstruas la floson el grandaj novhakitaj arboj, kiuj estas plenaj de freŝa suko, tiu efikas kiel impregno, tiel ke la flosa ne sorbas akvon kaj subakviĝas. Ne estas danĝero de eluziĝo de la ŝnuregoj, kiuj kuntenas la balzatrunkojn, ĉar la balzaligno estas same mola kiel korko kaj tial ne mordas la ŝnuregojn. Neniu alia akvoveturilo de ia ajn speco povas tiel sekure lasi sin konduki de fluoj kaj ventoj kaj gliti trans akrajn koralrifojn, ondrompiĝojn kaj bordajn ondfrakasojn. La malgranda specifa pezo de la balzaligno kaj ĝia preskaŭ nekredebla portopovo ebligas al oni kumporti multajn tunojn da provianto kaj trinkakvo en akvoczistaj korboj kaj lignocisterno, kiajn la bordindianoj uzis sur siaj flosoj. Kiam oni nur sekvas venton kaj fluson, la balzafloso havas la grandan avantaĝon, ke ĝi, kontraŭe al ĉiuj aliaj akvoveturiloj, povas esti manovrata de okaza personaro, kiu ne bezonas konsisti el maristoj.

Tial oni povas sekure konkludi, ke el ĉiuj ŝiptipoj, kiuj troviĝis ĉirkaŭ Pacifiko en la tempo antaŭ Kolumbo, la sudamerika balzafloso estis la plej marfortika kaj stabila kaj kiu

plej taŭgis por porti malnovajn kulturpopolojn vivaj trans la senfinajn marvastojn de Pacifiko.

Tiu miriga malkovro, ke la balzaflosoj de la inkaoj estis ne nur martaŭgaj sed montriĝis unu el la plej fortikaj ŝipoj ĝis nia tempo eltrovitaj, havas des pli grandan signifon, kiam oni atentis pri la lokaj ventoj kaj fluoj. La granda marfluo, kiu en sia tuta larĝo balaas norden laŭ la tuta bordo de Peruo kaj Sudameriko, ĝi plurapidas kiel larĝa riverego trans la tutan Pacifikon, kaj malmultajn semajnojn aŭ monatojn post la forlaso de la malnova bordo de la inkaindianoj, ĝi enfluas rekte inter la Polineziajn insulojn. Samdirekte kun tiu marfluo, la Humboldtfluo, blovas la eterna trado, la tutan jaron, ankaŭ de la malnova regno de la inkaoj rekte al Polinezio, por daŭrigi kune kun la fluo al la malproksimaj bordoj de Aŭstralio kaj Azio.

La signifo de tiuj ventoj kaj fluoj por popolmigrado en Pacifiko neniam trovis sufiĉan atenton. Nur kiam oni vivis 100 tagnoktoj sur trunkofloso sur tiu maro, oni komprenas, ke tute ne la nombro da kilometroj signifas ion tie ĉi sed la direkto de ventoj kaj marfluo. Sen helpo eĉ de padelo ni veturis 8.000 km de oriente al okcidente sur Pacifiko. Sed veninte al Polinezio ni preterdrivis du insulojn, ĉar ni ne kapablis lukti malantaŭen eĉ unu kilometron de okcidente al oriente.

Tial estis tute nature por la malnovaj kulturpopoloj en Peruo kaj iliaj balzaflosoj libervole aŭ kontraŭvole veni al la Sudmaraj insuloj. La loĝantaro de Azio havis malgrandan aŭ nenian naturan ŝancon por atingi tien kaj krome devis en nekomprenebla maniero preterpasi la Mikroneziajn insulojn, Novan Gvineon, Aŭstralion kaj Melanezion por ekloĝi sur la kontraŭa flanko de Pacifiko, plej proksime al Ameriko.

Oni asertis, ke kulturpopoloj el Peruo pereus pro manko de manĝaĵo kaj trinkakvo, longe antaŭ ol ili atingus tiujn insulojn, kaj ke ili ne estus povintaj plimultiĝi tie, ĉar ili ne estus povintaj kumporti virinojn. Oni forĝis, ke ankaŭ homoj el Azio ne povis plimultiĝi sen virinoj kaj ke ankaŭ ili bezonis nutraĵon kaj akvon dum la vojaĝo. Ĉar estas nediskutebla fakto, ke homoj loĝas sur tiuj insuloj kaj ke ili loĝis tie jam antaŭ ol nia propra mondparto konis tiun parton de la tero,

tial meritas atenton tio, ke neniu akvoveturilo laŭ la bordo de Azio havis tian ŝarĝokapaciton por kunpreni grandajn amasojn da akvo kaj provianto, kaj eĉ virinojn, kiel la balzaflosoj de Peruo.

Tiurilate la Kon-Tiki-ekspedicio sukcesis malkovri ankoraŭ unu sekreton. Montriĝis, ke flosveturantoj en la Humboldtfluo, dum la tuta vojaĝo al la Sudmaraj insuloj, havas eĉ la dompordo la tutan grandan nutrajprovizejon de la naturo. Se oni vojaĝas tie ĉi sur la maro per velŝipo aŭ linia ŝipo, oni vidas neniujn fiŝojn, ĉar oni vojaĝas tro rapide, ĉar oni estas tro malproksime de la marsurfaco, kaj ĉar la maŝino kaj la helico forpelas la fiŝojn. Sed kiam oni sidas senmova en trankvilo sur trunkflosa kiu sensonec drivas sur la ondoj, tiam venas grandaj amasoj da fiŝoj, kiuj serĉas rifuĝon ĉirkaŭ kaj sub la flosa, kaj oni devas esti tre senpova homo, se oni malsatmortas, kiam oni povas kapti la fiŝojn per la manoj. Kaj naturhomoj ne estis senpovaj.

Sur la tuta flosa kreskis manĝebla marherbo kaj mituloj, kaj malgrandajn pelagiajn* krabojn kaj alian manĝeblan planktonon oni povis kolekti amase. Ĉiunokte venis de si mem manĝeblaj flugfiŝoj kaj manĝeblaj sepioj sur la floson. Dum freŝa vento okazis, ke fiŝoj naĝis sur la floson kun la ondoj kaj restis kuŝantaj tie, kiam la akvo malaperis inter la trunkoj. Ĉiutage dum la tuta transveturo grandaj, bongustaj delfenoj tenis sin tuj apud la flosa, kaj oni povis laŭdezire kapti ilin kiam ajn. Kun flugfiŝo kiel logaĵo ni povis fiŝi ankaŭ tunfiŝojn, pilotfiŝojn kaj orajn skombrojn. Ankaŭ la ŝarkoj estis manĝeblaj, kiam la pecoj estis kuŝintaj en akvo, kaj en unu tagnokto ni tiris 9 grandajn ŝarkojn sur la floson.

Oni povis ankaŭ kolekti multe da pluvakvo sur la maro, kaj ĉar ni ĉiam povis kapti vivajn fiŝojn ne ekzistis danĝero morti de soifo. Kiel konate oni nome povas trinki la sukcon, kiun oni povas elpreni el la limfovazoj de la fiŝoj.

Kiam la moderna scienco konsideris, ke la prahistoria loĝantaro de Peruo estis izolita kaj ligita al sia propra kontinento

* Apartenantaj al la marvasto.



"El la nutrajprovizejo de la naturo"

kaj ne havis eblojn atingi la insulojn en Pacifiko, tio estis bazita sur neĝustaj premisoj sed ne sur realaĵoj.

La pure praktikaj rezultoj de la Kon-Tiki-ekspedicio ebligas — kaj necesigas — konsideri la nesolvitan pacifikan problemon sur bazo de aliaj premisoj ol pli fruaj.

Tial meritas atenton, kion la konata sveda etnografo profesoro Erland Nordenskiöld siatempe skribis. Li atentigis pri vico da interesaj kaj neordinaraj kulturelementoj, kiuj estas komunaj por la insulanoj en Pacifiko kaj iliaj najbaroj inter la kulturpopoloj de Sudameriko. Speciale li substrekkis, ke estas gravege atenti pri tio, ke la kalabaso, *Lagenaria Vulgaris*, kiu estas unu el la plej gravaj kulturplantoj de la pacifikaj insulanoj, apartenis ankaŭ al la malnovaj indian kulturoj en Peruo. La semoj de tiu kreskaĵo ne povas disvastiĝi trans tiajn grandajn oceanojn krom per helpo de homoj kaj iliaj akvoveturiloj, kaj Nordenskiöld tial asertis, ke la kalabaso estas la plej grava pruvo pri tio, ke efektive ekzistis komuniko inter Sudameriko kaj la Sudmaraj insuloj, jam antaŭ ol Ameriko estis trovata de nia propra raso.

Nordenskiöld, kiu ne suspektis, ke la sudamerikaj balzaflosoj povas transiri Pacifikon, supozis, ke origine la insulanoj kulturis la kalabason kaj poste per siaj kanotoj transvelis al Peruo kaj enkondukis ĝin tie. Li substrekis, ke tial estas tre grave, ke la botanikistoj havigu informojn pri la historio de tiu lagenariaplanto en la malnova Ameriko en la tempo antaŭ Kolumbo.

Nordenskiöld ne ĝisvivis la respondon al la demando prezentita de li. La respondo venis nur pasintsomere (1949) de la konata amerika arkeologo dro Junius Bird. Dro Bird estis farinta elfosojn en la plej malnovaj kulturtavoloj inter la fiŝistaj indianoj ĉe la bordo de Peruo, kaj analizo de lia trovaĵo prezentis multnombrajn fragmentojn de *Lagenaria Vulgaris*. Tio montras, ke la kalabaso estis konata kaj uzata de la bordindianoj en Peruo, sur la amerika kontinento, pli ol mil jarojn antaŭ ol la unuaj homoj ekloĝis sur la solecaj insuloj en Pacifiko. Tial troviĝas grava kaŭzo por kredi, ke la kalabaso same kiel la batatoj estis transportata trans la maron de Peruo al la Sudmaraj insuloj sur la martaŭgaj balzaflosoj de la bordindianoj.

Proksimume samtempe kun tiuj trovaĵoj la tri amerikaj botanikistoj Hutchinson, Silow kaj Stephens prezentis ankoraŭ pli epokofaran malkovron.

Oni malkovris, ke la sovaĝa kotonplanto de la Sudmaraj insuloj origine estis sovaĝiĝinta kulturplanto, kaj ĝi tute simple estas devenspeco de tiu kotonplanto, kiun kulturis la prahistoriaj indianoj en Peruo. Ĝi ne volis kruciĝi kun la azia kaj la malaja kotonplantoj, sed ĝi volonte kruciĝis kun la plantoj de la aztekoj en Meksiko kaj tiu de la inkaoj en Peruo. Kromosom esploroj pruvis, ke ĝi origine estis transportata kiel kulturplanto de la prahistoria Ameriko al la Sudmaraj insuloj. Post tio oni ne povas kontesti, ke la grandaj indianaj kulturpopoloj transiris Pacifikon antaŭ ol Kolumbo kun siaj karaveloj transiris Atlanton.

Sed la problemoj ne finiĝas tie.

Hutchinson kaj liaj botanikistoj trovis, ke la malnova kotonplanto de la indianoj prezentas pli da malkovroj. Nome montriĝis plue, ke la prahistoria amerika kotonplanto siavice

estis rekta devenspeco de tiu kotonplanto, kiun kulturis la kulturpopoloj de la Malnova Mondo longe antaŭ la tempo de Kolumbo. Tiu malkovro vekis atenton en la tuta scienca mondo kaj tute ŝanĝos nian nunan koncepton pri la deveno de la amerikaj indianoj. Ni nuntempe scias kun sufiĉe da certeco, ke la plimulto de la multnombraj indiantriboj, kiuj loĝas en Nord- kaj Sudameriko, devenas de popoloj, kiuj enmigris el Azio. Dum la paso de jarmiloj la malnovaj fiŝistaj kaj ĉasistaj popoloj de Azio migris de Siberio trans la Markolon de Bering kaj trans la Aleŭtajn insulojn en Alaskon, de kie ili picde daŭrigis sian disvastiĝon suden en la Nova Mondo.

Tiu fakto estas neskeuebla. Sed la fakto nun montrita, ke la kotonplanto estis transportata de la Malnova Mondo al Ameriko antaŭ Kolumbo kaj antaŭ ol la vikingoj atingis Amerikon, tio enigis tute novan faktoron en la bildon.

La botanikistoj povas rakonti al ni, ke tiuj homoj, kiuj kunportis la kotonplanton, ne povis veni la ordinaran vojon tra Siberio-Alasko, ĉar la klimato en tiuj nordaj regionoj neniam estis tia, ke la kotonplanto povus travivi. Tiu certa homgrupo tial devas esti ŝipe transirinta la maron kaj suririnta la bordon rekte en tiu tropika aŭ subtropika zono de Ameriko, kiun norde limigas Meksiko kaj sude Peruo aŭ Brazilo. Tiuj individuoj ne povis esti ĉasistaj aŭ fiŝistaj popoloj sed kulturpopolo, ĉar ili jam en sia hejmlando uzis la kotonplanton kaj kunlige kun tio konis la teksarton.

Ni ne scias, kiuj estis tiuj marveturantoj, sed ĉar ili estas devintaj transiri la maron en la tropika zono, ili atingis Amerikon aŭ trans la sudan Atlanton aŭ trans la sudan Pacifikon. Pacifiko estas pli ol kvinoble pli larĝa ol Atlanto, kaj la Kon-Tiki-ekspedicio montris, ke en tiu parto de Pacifiko la drivo okazas ĝuste en mala direkto. Aldone al tio, kiel ĵus dirite, la botanikistoj montris, ke la kotonplanto de Pacifiko venis ne el Azio al la Sudmaraj insuloj sed de Ameriko. Tial ĉio subtenas la penson, ke la kotonplanto atingis Amerikon per akvoveturiloj, kiuj transiris sudan Atlanton jam antaŭ la hispanoj.

La plej malnova konata hejmlando de la kotonplanto estas la valo de Indus. De tie ĝi atingis Ĉinuĵon nur ĉ. 700 jarojn

post Kristo, sed oni certe scias, ke ĝi estis kulturata i. a. en Arabujo jam 350 jarojn antaŭ Kristo.

Eble estas al la pli multaj malfacile pensi, ke la malnovaj kulturpopoloj povis per siaj primitivaj akvoveturiloj iri de la afrika bordo al la tropika Ameriko, antaŭ ol Kolumbo malfermis tiun linion. En tio la Kon-Tiki-ekspedicio eble povas denove doni praktikan sugeston. Ni vojaĝis 8.000 kilometrojn sur la marvasto sur nia primitiva trunkflosa, kaj neniu perdis sian vivon. Tio signifas, ke ni veturis 4.300 marmejlojn. Estas nur 1.700 marmejloj inter Afriko kaj Sudameriko, kaj trado kaj marfluo iras ĝuste samdirekte kaj estas ĝuste samfortaj kiel tiuj vento kaj fluo, kiuj helpis la floson Kon-Tiki transiri Pacifikon.

Estis eble transiri kontinentojn antaŭ la eltrovo de fervojoj kaj aŭtoj, kaj eĉ se estas plej sekure transiri oceanon per moderna ŝipo aŭ flugmaŝino, tio ne signifas, ke estis neeble transiri ĝin alimaniere en prahistoria tempo.

Troviĝas oceanoj kiuj mem helpas treni primitivajn akvoveturilojn for de iliaj propraj bordoj kaj surterigi ilin sur tute aliajn bordojn.

La norvegan manuskripton tradukis S. Engholm.

La spirita mondo

De prof. PORTO CARREIRO NETO

Tiu ĉi art. venis responde al la artikoloj de C. Joon kaj K. Wilgenhof en nro 3/49.

"Spiritualismo — definas Allan Kardec, la kodiginto de spiritismo — estas la malo de materialismo; kiu kredas, ke li havas en si ion krom materio, tiu estas spiritualisto; sed ĉi tio ne sekvas, ke li kredas la ekziston de spiritoj kaj ties komunikadon kun la videbla mondo." Ankaŭ: "... la *spiritisma* doktrino, aŭ *spiritismo*, havas kiel principon la rilatojn inter la materia mondo kaj la spiritoj aŭ estuloj de la nevidebla mondo. La adeptoj de spiritismo estas *spiritistoj*."^{*}

El tiuj difinoj ni do klare vidas, ke spiritismo estas unu el la fakoj de la ĝenerala spiritualismo, sed nur ĝi praktikas tian interŝanĝon kaj prenas sian tutan forton el la konstanta, ordinara komunikado de la tiel nomataj "spiritoj" kun la homoj ankoraŭ vivantaj sur la tero; ĉiuj aliaj doktrinoj nematerialismaj riluzas akcepti la eblon de tia komunikado, aŭ ĝin ne praktikas, aŭ ĝin eĉ malpermesas, se nur tiuj ne estas, kiel ekz. eĉ katolikismo, kun la "sanktuloj": ĉiuj aliaj spiritoj, laŭ la roma eklezio, estas la "demono" mem. Tiu difino estas do grava por ĉiu serioza homo, deziranta kompreni, kio nome estas la vivo.

Per la "oficiala" scienco la homo iom post iom forpelas de sia "interna mondo" la timon antaŭ tute naturaj fenomenoj, kiujn la sovaĝulo rigardis kiel eksterordinarajn, aŭ "supernaturajn", aferojn. Ankaŭ en la okuloj de la antikvaj grekoj, la fulmo, ekzemple, estis fajra sago, forĝata de Vulkano kaj ĵetata de Jupitero en momentoj de tre prava kolero kontraŭ la mizeraj teranoj. En la materia mondo la "homa" scienco paŝon post paŝo klarigas do la *naturajn* okazaĵojn. Ĝi tamen, almenaŭ hodiaŭ, ne sufiĉas por klarigo de faktoj ankoraŭ kuŝantaj ekster ĝiaj laboroj, kaj sekve ĝi ne havas tian aŭtoritaton, ke ĝi povus ion aserti pri ili; tiaj faktoj, ni diras, apartenas al alia "sfero", al la sfero de la "spirito"; en tiu kampo fariĝas fenomenoj, almenaŭ ŝajne nenion komunan havantaj kun tiuj okazantaj en la "fizika" mondo, kiun la sciencistoj konsideras pure materia. Kiam la "surtera" scienco pli enprofundiĝos en la sekretojn de la naturo, tiam ĝi espereble konstatos la unuecon de la universo, kaj nur tiam ĝi rajtos doni sian opinion pri la ebleco — kiu en tiu tempo estos certeco — de la interkomunikado de la "du mondoj": la nia kaj la nevidebla.

Por tuj de la komenco klarigi la aferon, estu dirite, ke ne la homoj "elpensis" spiritojn, kiel fruktojn de ia halucinacio, sed la spiritoj mem sin prezentis kiel homojn, iam vivintajn sur la tero — kaj eĉ sur alia planedo —, kun tiaj identigaj signoj pri sia persono, ke neniu povus nei la fakton. Pli kompleta elvolviĝo de ĉi tiu temo estas neebla en mallonga artikolo; al tiu, kiu

* Allan Kardec — La Libro de la Spiritoj, esperanta traduko, eld. 1946 de Brazila Spiritisma Federacio, Rio de Janeiro, Brazilo.

havas veran intereson pri ĝi, mi povas nur konsili, ke li legu la cititan verkon de Kardec, kaj ke li penu legi iom pli, antaŭ ol fari hipotezojn, preskaŭ certe erarajn. Estas kurioze konstati, kiel facilanime ni faras hipotezojn kaj eĉ neas realajn faktojn sur kampo, kiun ni neniam esploris!

Spiritismo ne estas simpla "kredo" aŭ fantazia koncepto pri la mondo. Aŭgusteno, kiun la roma eklezio sanktuligis, asertis: "Credo quia absurdum": li ja *kredis*, ĉar la neordinaraj faktoj, kiujn li ĉeestis aŭ pri kiuj li aŭdis, aŭ la dogmoj, kiujn lia eklezio altrudis, estis por li absurdataj, tio estas, li ilin ne komprenis. En la spiritisma doktrino ekzistas nenia "kredo", ĉar ĉio estas evidenta; kaj kio estas klara, videbla, sentebla, palpebla, tion oni ne kredas, tute rezignante ĝian komprenon, sed oni asertas, ke ĝi ja estas vera, kvazaŭ "materiala". Oni ĝin konstatas tiel bone kaj konvinkte, kiel la sciencisto observas kaj registras faktojn en sia laboratorio.

Tiuj estuloj, kiujn ni speciale nomas "spiritoj", estas homoj, kiuj iam vivis en nia medio: ni *estis*, same kiel ni *estis*, tiaj, ĉar la vivo ne finiĝas eĉ la "morto", nek komenciĝas nur en la tago, kiam ni *nun* festas nian "naskiĝon". Kiam do ni, t. e. ni spiritoj, malaperas de sur la tero, tie forlasinte la karnon, ni ne "komencas" novan vivon, sed fakte ni reprenas nian liberan staton, tute sendepende de ia materia envolvajo, kiu estis necesa nur en tia materia mondo, kia estas la terglobo. La spirito havas alispocan veston, kaj ĝuste tiun li kunportas por sia vivo en la spaco: restas en la tero la karna korpo, kiu — bonvolu atenti! — ne "mortas", sed discriĝas. Ankaŭ rilate al tio, kion ni ordinare nomas "morto", multo devus esti dirata; kaj same pri la "vivo" ...

Nenia fantazio estas do la fakto, ke la homo konsistas el pli ol unu "principe". En tiu *vero* sin kaŝas ne ia "koncepto" de la homa penso, ia eraro, nutrata jam de jarcentoj; kontraŭe: se tia *konstato* estus eraro, ĝi jam ne povus sin teni, aŭ ni devus konkludi, ke la homo estas kompatinda stultulo! Dank' al Dio, tiu vero estas ĉiam konfirmata de la faktoj, kaj la scienco mem, kiu ĝin ankoraŭ mokas, forte kunhelpas por ĝia universala proklamado.

Oni atentu ankaŭ al tio, ke ne ĉiuj "psikaj" fenomenoj devas

nepre esti atribuatataj al la ago — almenaŭ la sola ago — de iu spirito; la transsendo de la penso, ekzemple, ne bezonas la intervenon de iu estulo, vivanta en la spaco, tio estas, spirito, kiu "transportus" la penson. La penso estas io "konkreta", iranta laŭ ondoj, simile al la lumo kaj al la elekto. Same kiel la penso, la spirito de vivanto povas trairi la spacon ĝis la loko, kie li deziras aperi: tiuj estas la "fantomoj de vivantoj", pri kiuj nenia dubo ekzistas; ili ne estas ia senteraro de frenezulo.

Se tiuj, kiujn ni nomas "mortintoj", havas personecon, ni facile komprenas, ke ili, *ankoraŭ vivante*, povas lasi eĉ ni siajn signojn: parolon, skribon, figuron mem, kiun ni konas per la nomo "aperaĵo". Tiaj aperaĵoj povas preni plej diversajn aspektojn, de nura fluideca ombro ĝis tuta "materiigo", kiu ebligas, ke oni ĝin tuŝu, palpu, aŭskultu ĝian koron, kaj kiu eĉ lasas en la manoj de la kunsidantoj pecojn de la ŝtofo de sia vesto, freŝajn fremdlandajn florojn ktp., krom premsignoj de fingroj, manoj, piedoj k. a. en fluidigita, bolanta parafino! Neniu serioze povus imagi, ke tiaj fenomenoj estas ia senteraro, nek pensi, ke la "mediumo" (aŭ alia persono) kuraĝus enmeti sian manon, piedon aŭ vizaĝon en bolantan fluidaĵon! La demando estas tro kompleksa, ke oni ĝin povus solvi supraĵe, per rido aŭ per hipotezoj.

Certe, kelkaj spiritoj, sin manifestantaj per mediumo, ne scias pri la vivo pli ol ni mem; aliaj estas multe pli instruitaj kaj konigas afecojn, kiajn ni neniam eĉ ekpensis: tio, kion ili diras, buŝe aŭ skribe, kuŝas multe super niaj konoj kaj eĉ trans nia imagemo; kelkafoje ilia parolo estas rekte kontraŭa al niaj ideoj. La faktoj, sur tiu kampo, estas tiel strangaj (por ni), kiel diversaj; kompreneble, la temo ne povus elĉerpiĝi en revuartikolo. Ĝuste tial, ke la "nckonscianta" mediumo ne scias, kion li faras, kiam en lin "enkorpiĝas" iu spirito, kreskas la garantio de vereco de la fakto.

En Brazilo ni havas mediumon, nomatan Francisco Cândido Xavier, eble la plej rimarkinda mediumo, iam ajn konata. Li estas modesta ŝtatoficisto en nia internlando kaj faris nenan gimnazian kurson. Eĉstus interese ekscii, ĉu iu povus klarigi, alie ol per la spiritisma doktrino, kiel F. C. Xavier jam skribis kaj publikigis, de la jaro 1932 ĝis hodiaŭ, *tridek sep verkojn*,

proze kaj verse, kun plej malsamaj stiloj kaj pri plej diversaj temoj — literaturaj kaj sciencaj — en tia maniero, ke neniu povus ne konfesi, ke tiaj verkoj devenas de la koncernaj subskribintoj; kelkaj el tiuj aŭtoroj lasas sur la papero, per la rapidmova kraĵono de la mediano, sian perfektan subskribon. Versojn F. C. Xavier skribas tiel senembarase, ke la sonetoj (kelkfoje unu post alia dum kunsido) ne bezonas pli ol *tri minutojn!* Privataj komunikaĵoj, eventualaj preĝoj, komentari-oj pri versetoj de la Evangelio ktp. formus aliaj multajn volumojn.

Fine, mi dezirus diri, ke ĉiu el ni, vivantaj sur aŭ ekster la tero, estas individuo, kun kapabloj propraj. Kiam ni, en la spaco, devas "enkarniĝi (ĝustodire "reenkarniĝi"), estas zorge elektata por ĉiu, ankoraŭfoje vivonta sur nia planedo, la medio konvena al la agoj, kiujn li devas plenumi. Li do ricevas "korp-on" (t. e. pli densan materion) en familio, en lando kaj en epoko, taŭgaj por lia evoluado. La sperto de niaj antaŭuloj forte kontribuas al nia progreso, ĉar ĉiufoje, kiam ni "malsupreniras" por *nova ekzistado*, ni trovas plibonigitan medion, ĉu materiala, ĉu morale, ĉu intelekta; sed tio ne signifas, ke la sperto de niaj antaŭuloj estas "amasigita" en ni, ĉar ni mem ja kunportas nian propran sperton, kiun ni devas uzi por nia profito. Spirita strukturo ne estas io transigebla, kiel, ĝis ioma grado, la materia organismo.

Pri ĉi tiu interesa afero, kiel koncerne aliajn demandojn, ĉiu el ni devus memori la vortojn de Hamleto:

"Ekzistas en ĉiel' kaj sur la tero
Pli da aferoj, ol en la lernejoj
Instruas filozofoj, Horacio."

Komentoj

Respondo al "Germana letero" en MR nro 3/49.

"En nro 3/1949 de Malgranda Revuo troviĝas 'Germana letero', kiun mi — kiel germanino — ne povas lasi nerespondita. Kun indigno kaj honto mi legis tiun leteron; sed por eviti

miskomprenon, mi volas enkonduke konstati, ke kompreneble ekzistis rezista movado en Germanujo dum la hitlera tempo (mi atentigas pri la libro 'Dokumentoj de la Rezistado' de H. Theobald), kaj krome mi volas konstati, ke ekzistis granda aro da germanoj, kiuj individue kontraŭstaris ĉiujn propagandajn mensogojn kaj ĉiujn flagojn de la hitleranoj; sed mi devas ankaŭ konstati, ke ni ĝisfundaj kontraŭuloj de Hitler, kiuj ne povis trovi 'almenaŭ ion bonan' en la hitlera politiko, estis la malplimulto; la plimulto kapitulacis en 1933 antaŭ Hitler. Ni germanoj ne sukcesis liberigi nin mem de la nacisocialismo. Tio estas nerifutebla fakto, kaj la ekkono de tiu fakto devus esti la bazo de nia estonta konduto en la 'granda rondo familia'.

Ni ne primitive senkulpigu nin, dirante ke la alilandanoj demandu sin, kiel ili estus kondukintaj en nia situacio. Se ni volas konstrui novan demokratian kaj humanecan Germanujon, ni devas unue forbalai la malpuraĵon antaŭ nia propra perdo kaj tute sincere konfesi, ke ni hontas pri tio, kio okazis en la *nomo de la germana popolo* dum la hitlera tempo, kaj ni demandu nin mem, kiu estas kulpa pri tio, ke Hitler en 1933 ricevis plenpotencan en nia lando. Ni direktu nian atenton ne al tio, kion 'la aliaj' faras, ni donu al nia lando novan sanan fundamenton kaj eduku nian junan generacion al memstaraj plenkonsciaj homoj, kiuj sentas sin individue respondecaj pri la sorto de sia lando, sen konsidero al tio, kion 'la aliaj' faras.

Sed kiel vi volas eduki la germanan junularon, se vi mem ne liberiĝas de la malnova pensmaniero? La skribinto de 'Germana letero' verkis perfektan pamfleton por denove vivi anti-semitismon; ĉiujn liajn argumentojn ni povis legi ĉiutage dum la hitlera epoko en la propagandaj ĵurnaloj de Goebbels. Jam la esprimo 'judemuloj' portas en si pinton kontraŭ la judoj; ĝi montras, ke la skribinto ankoraŭ ne liberiĝis de la rasa malamo. Kaj liaj akuzoj kontraŭ la konduto de la 'rusaj kaj polaj judoj' en Germanujo post la unua mondmilito estas tiom gravaj kaj samtempe maljustaj, ke mi bedaŭras, ke ili estas publikigitaj en internacia gazeto kia Malgranda Revuo. La skribinto de la letero uzas nian zamenhofan lingvon, sed li ŝajnas forgesi,

kie Zamenhof naskiĝis kaj kiom li suferis pro la genta kaj rasa malamo kaj kial li kreis esperanton.

Mi rekomendas al la skribinto de 'Germana letero' studi iom la historion; tiam li trovos, ke kontraŭjuda propagando kaj pogromoj (ĝiaj sekvoj) okazis ĉiam tiam, kiam la regantaj potencoj volis kaŝi siajn proprajn fiagojn.

Prava estas mia samlandano dirante: 'Kio okazis, tion oni ne povas fari neokazinta'; sed oni povas zorgi por ke tio ne denove okazu, kaj por atingi tion ni unue senŝarĝigu nian propran konsciencon per klara esploro kaj ne akuzu 'la aliajn'; ni komencu ĉe ni mem!

En tiu senco salutas vin

via
Elisabeth Bünemann."

Redakcia rimarkigo.

Post la apero de "Germana letero" amiko sugestis al mi, ke ĝi estus devinta aperi kun redakcia komento. Komento estis bezonata. Se mi ne havas principan motivon por tuja redakcia komento, mi tamen preferas atendi komenton de legantoj. Mi ĝojas, ke la supra komento venis kaj ke ĝi venis el Germanujo.

La rebato de sinjorino Bünemann kontraŭ la verkinto de "Germana letero" estas tiom forta — kvankam ideo tute prava — ke mi devas diri ankaŭ mian koncepton pri la letero.

La verkinto de "Germana letero" legis mian artikolon "Vortoj kaj realo" en nro 2/49. Iun frazon en ĝi li erare interpretis tiel, ke mi kondamnas ĉiujn unuopajn germanojn pro la maljustaj agoj dum la hitlerepoko. Protesto kontraŭ tia koncepto — kvankam ĝi troviĝis nur en lia supozo — laŭ mia kompreno estas prava. Kontraŭ la koncepto pri kolektiva respondeco kaj kolektiva kulpo skribis ankaŭ mi en nro 2/47 (Kolektiva respondeco), kiun artikolon la leterverkinto tamen ne estis tiam leginta.

Mi estas plene konvinkita, ke la leterverkinto estas nek hitlerano nek antisemito. Laŭ mia kompreno li defendis nek antisemitismen nek fiagojn, li nur protestis kontraŭ tiu koncepto, ke ĉiuj germanoj estas kulpaj. Pro lia prezentmaniero de

la ekzemploj la legantoj tamen povas facile ricevi la impreson, ke li per tiuj ekzemploj volas prezenti ĝenerale validan bildon (kvankam li mem atentigas, ke li parolas nur pri la kamparo kaj malgrandaj urboj — kaj tie tamen loĝis la pli granda parto de la germana popolo). Krome lia esprimmaniero pri la juda demando kelkloke estas nefeliĉa. Laŭ mia koncepto li malgraŭ tio rajtis paroli, same kiel ĉiu havu tiun rajton. Se iu eraras, la pli ŝaĝaj montru en kio li eraras.

Kluba problemo.

En nro 1/49 Gunhild Tistad skribis iom pri la emo al amuziĝo en la esperantokluboj. Pro manko de aliaj voĉoj mi prokrastis pritrakton de tiu temo.

Pasintprintempe gesinjoroj Bünemann, Hamburgo, preterpase esprimis sian penson pri la afero: "La diroj de Gunhild Tistad estas tre trafaj kaj absolute respegulas la cirkonstancojn sub kiuj ni vivas, mi preskaŭ volus diri: suferas, ĉi tie. Kiom ofte mia edzino kaj mi, revenante de la kunestoj, diras unu al la alia, ke ni malnovaj esperantistoj estas kvazaŭ la arlekenoj kondamnitaj elpensi ĉiam novan allogaĵon kaj tamen ne ricevantaj sufiĉe da eĥo pri la veraj esperantaj aferoj en la publiko. Nu, sed tiuj malmultaj, kiuj vere komprenas la internan enhavon de nia afero, kompensas la mankojn de la senfaruloj." —

Antaŭ nelonge venis la sekvanta oldiro de Julio Csapó, Rumanujo: "Mi samopinias kun la verkinto, ke ni ne povas gajni kaj konservi membrojn nur per festoj. Precipe en la nuna socio ni havas tiom da viglaj societovivoj, ke ilin superi niaj esperantokluboj ne kapablas. Niaj kluboj estas ja tute alispccaj. — Pravas la opinio, kiu diras: 'Ni donu al la homoj tion, kion ili ne povas trovi aliloke'. Kaj tion doni sufiĉas: la lingvon kaj la internan idcon. Ambaŭ estas, eĉ ĉiu aparte, tiel kompleksaj kaj enhavoriĉaj, ke ili donas al kuraĝa kaj sindona ekspluatanto senfinan agadkampon. — Ekzistas amuzado serioza kaj unika por niaj kunvenoj. Ni devas nur trovi la rimedojn kaj manierojn, laŭ kiuj ni devas kompili kaj prezenti nian specialan pro-

gramon. Jen la du bazoj: la lingvo kaj la movado. El ili ni povas ĉerpi senfinan materialon." —

La redaktoro:

Ĉu la tro unuflanka amuziĝemo kaj manko de serioza intereso en la kluboj ne grandparte dependas de tio, ke oni longtempe pli atentis pri kvanto ol kvalito? Amaskursoj, grandegaj kluboj — tio imponos al la mondo kaj sukcesigos nian aferon! El la granda nombro post unu jaro aŭ du restas eble 10—20 procentoj, kaj el tiuj tri kvaronoj nur pro inerto. Estus pli bone, se ni povus akiri al nia movado taŭgajn kaj konvenajn homojn ol akiri amasojn da lernantoj kaj klubanoj. La homoj estas diversaj, ankaŭ rilate al esperanto. Efektive nur malmultaj havas tiujn kvalitojn, kiuj faras esperanton vere valora por ili kaj ilin valoraj por esperanto. Trovi ĝuste tiujn malmultajn estas grava afero, kiun oni dum la lastaj jardekoj ofte forgesis. Ŝajnas al mi laŭ historio, ke la esperantistoj antaŭ 1914 havis pli da esperantista solideco kaj pli altan spiritan kvaliton ol la esperantistoj post 1918. Se jes, ĉu tio ne dependis de individua, laŭpersona, laŭcela varbado?

Persone mi estas tiom herca, ke mi diras, ke esperantisto faras pli bone, se li kiel eble plej multe uzas esperanton por sia propra utilo kaj plezuro, ol se li limigas sian propran interenson favore al tiaj lernantoj kaj klubanoj, kiuj jaron post jaro venas nur por serĉi iom da distro. Nia tasko estas pli grava ol amuzi homojn.

Oni respondas al mi, ke nia tempo estas tempo de amasmovadoj, ke la rimedoj aplikeblaj antaŭ 1914 ne taŭgas nun. Al tio respondas mi, ke amasvarbado kaj amasmovadoj taŭgas por milito kaj aliaj malbonaj faroj sed ne por konstrua spirita laboro. Ĝi povas baziĝi sole sur konscie agantaj kaj respondaj individuoj — kompreneble des pli bone ju pli multaj ili estas. Sed prefere deko da tiaj individuoj ol dekmilo da amasanoj en si mem sencelaj, indiferentaj kaj inertaj.

Per tio mi ne kondamnas grandskalan propagandon, diras nur miajn proprajn pensojn. Sed certe ni povus pli psikologie kaj celkonvenc elekti la viktimojn de nia propagando, kaj certe tio estus avantaĝa kaj por la movado kaj por ni persone.

Literaturo

James D. Sayers: Invito al ĉielo.
Eldonis: Siegfried Ziegler Eldonejo
Prezo ne indikita.

Antaŭ nelonge sro Hult postulis en MR pli belajn kaj pli bone faritajn librojn. Jen unu. La papero estas tre bona, la bindo solida, la kartona kovrilo bongusta, la ilustrita papera protektkovrilo bonkvalita. La tipografio estas en si mem plaĉa, sed bedaŭrinde troviĝas tie kaj tie difektitaj literoj. Tiu manko ne detenu vin de aĉto de la libro. Ĝi rilatas sole al belaspekto kaj neniel malhelpas legadon.

La protektkovrilo prezentas mondspacan raketveturilon survoje al Marso. Tiu bildo indikas la ĉefan kadron de la okazado sed ne ĝian scencon (kaj estus tre malfacile prezenti ĝin per unu bildo). La scenco troviĝas sur la spirita, homevolua plano. Oni eble povas diri, ke estas la rakonto de Jules Verne levita al la spirita plano. Antaŭ la legado de tiu ĉi libro mi apenaŭ estus kredinta, ke fantazia teknika romano povus sukcese servi kiel esprimilo por serioza kaj profunda vivkoncepto. Leginte la libron mi konstatas, ke la aŭtoro sukcesis en tio, laŭ mia impresado plene. Ke li sukcesis devas dependi de lia propra personeco, de lia propra alta vivkoncepto. Lia celo estis prezento ne de fantazia okazado sed de tio, kio entute, absolute, estas la plej grava en nia vivo.

La tempo estas kelkajn jarojn estonte de la nia, kaj la nunaj problemoj kaj danĝeroj fariĝis akutaj. La enhavo efektive estas arde aktuala, por ĉiu homo en la mondo. La aŭtoro mencias, ke la unua instigo al tiu rakonto estis libro, kiu interpretis bibliajn profetaĵojn laŭ rilato al nia tempo. Mi ne scias, ĉu la aŭtoro konsideras tiujn klarigojn pli malpli laŭlitere veraj. Se jes aŭ se ne, li ĉiuokaze pentris grandiozan bildon de la plej scenca afero en la homa ekzistado. Al mi persone ŝajnas, ke maŝinoj ludas tro gravan rolon en la vivo de spirite tiel altnivela homoj kiel la marsanoj. Tio tamen estas punkto kiu, se ni eventuale ne aprobas ĝin, neniel detruas la scencon de la libro.

Legante tiun libron mi ĉiam havis la senton, ke mi legas ion

seriozan kaj tre gravan, kion mi devas serioze konsideri. Tiu efiko, kiel dirite, devas dependi de la personeco de la aŭtoro, sed la rimedo por atingi ĝin estas la stilo. Se mi ne tre misjuĝas, ĝi havas en sia esperanta formo multajn valorajn kvalitojn de bona angla stilo, kaj mi kredas, ke oni povas nomi ĝin bona, cĉ se oni uzas *Biblion* aŭ *Vojaĝojn de Gulliver* kiel mezurilon.

Kelkaj rimarkigoj: sur p. 33, l. 5, la vorto "cirkaŭi" estas erara kaj malklara. Ĉirkaŭiris? Ĉirkaŭkaptis per la rigardo? — Meze de la sama p.: Fariĝis — estis farata; samlinie: travidebla — travidebla. — Kelkajn liniojn pli malsupre: tiel travidebla, tiom diafana — la du vortoj ne estas samsignifaj. — P. 54 kaj aliloke troviĝas "senkonscie" anst. "nekonscie". — P. 57 kaj 58 "ĝentile" iom strange uzata anst. ekz. "molve", "malpeze". — Kelkloke estas uzata "popolo", kie mi preferus "homoj". — Sur P. 126, 137, 151 kaj eble aliloke "tiam" anst. "poste". Ŝajne la sencoj "poste" kaj "tiam" estas tiel kunfunditaj en la angla "then", ke anoj de la angla lingvo skribante esperanton ne ĉiam atentis pri la diferenco. Mi ofte vidis tiun eraron.

S. Engholm.

C. A. Pruisen: *Komercaj leteroj*.
Eldonis: The Esperanto Publishing Co, Ltd.
Prezo: 2 ŝ., afr. 2p.
Havebla ĉe landaj libroservoj kaj por revendo de la eldonejo.

Mi trovas tiun libron tre bona kaj tre zorge farita. La lingvo estas bonega. La klarigoj estas klaraj kaj por ĉiu senpene kompreneblaj. Post ĉiu nova leterspaco sekvas bone kaj interese aranĝitaj taskoj por la legantoj. Tiom da komerca kaj komerckoresponda scio, kiom troviĝas en tiu libro, estas utila al ĉiu homo kaj ofte bezonata. Tial mi rekomendas ĝin ne nur al fakuloj sed al ĉiuj.

Rimarkigoj: La aŭtoro uzas la vorton procento singulare, ankaŭ kiam temas pri pluraj centonoj, ekz. "20 procento". En esperanto kiel en naciaj lingvoj "procento" efektive estas pensata kaj uzata kiel "centono". Tial la ordinara uzado — do "20 procentoj" — ŝajnas al mi pli ĝusta. Sur p. 47 troviĝas cĉ "pro

cent". Se la aŭtoro konsideras tion esperanta esprimo, devus esti "por cent" (ekz. por 100 monunuoj oni ricevas profite 5 monunuojn). "Pro" signifas "kaŭze de". Se la esprimo estas el alia lingvo, la prunto estas ne necesa. La sama eraro aŭ necesa prunto troviĝas en la prokurista subskribo "pro Komerca Kompanio ...". — Sur p. 6: "samspecaj kiel". Sen kondamni tion mi preferas "samspecaj kun". — La esprimo "ŝipestra manifesto" faras strangan impreson al fremdulo en komerca lingvo, scianta la ordinaran signifon de "manifesto". Ĉu ne sufiĉas "deklaro"? — Ĉu anstataŭ "premio" (pago de assekurito) ne sufiĉas "premio"? El lingvologia vidpunkto la unua estas same erara kiel la lasta, ĉar la sola sencohava parto en ĝi estas "premi". Kaj se ni volas diri, ke tiu pago estas rekompenco al la firmo pro ĝia respondeco, "premio" ŝajnas al mi same taŭga kiel "premio".

La aŭtoro rekomendas dividon de vortoj, kiuj estis kunmetaĵoj en latino aŭ la greka, laŭ iliaj vortelemcntoj, ekz. katolika, red-akcio, simptomato. Postuli tiom da lingvoscio ĉe ĉiuj esperantistoj aŭ cĉ ĉe la plimulto, tio ŝajnas al mi troa. Mi eĉ dubas, ĉu estas ĉiam konsilinde dividi laŭ la etimologio. Ĉiokaze ni ne sen grava kaŭzo malfaciligu esperanton.

S. Engholm.

Jarlibro de UEA, 1949, dua parto,
kun Marista Terminaro.
Liverata nur al individuaj membroj de UEA.

Same kiel en antaŭaj jaroj la dua parto de la jarlibro de UEA ankaŭ nun enhavas fakan terminaron, en tiu ĉi jaro maristan. El propra sperto mi scias, ke tia terminaro estas tre bezonata. La vortoj estas grupe ordigitaj, kaj sub la koncerna rubriko oni facile trovas, kion oni serĉas. Multe da desegnoj klarigas la sencojn de tre granda parto el la terminoj. Tiel ankaŭ homoj fremdaj al tiuj esprimoj povas senpene trovi la precizan signifon.

En tiaj vortlistoj anstataŭigo de tiu aŭ tiu vorto per alia foje estas ebla aŭ eĉ dezirinda. Se mi juĝu laŭ mia tute nefakula vidpunkto, tiaj eventualaj vortoj estas en tiu ĉi vortaro tre

malmultaj, kaj la tuto ŝajnas al mi tre bona. — Volonte mi estus trovinta en la terminaro ankaŭ titolojn kaj profesiindikajn vortojn.

Flanka rimarkigo: Por verkantoj, precipe tradukantoj, kontentiga provizo da precizsignifaj fakterminoj fariĝas pli kaj pli grava. La kvanto da fakvortoj aperintaj en la jarlibroj kaj aliloke estas efektive sufiĉe granda. Sed kiom da tradukantoj kaj verkantoj havas ĉiujn tiujn listojn apud si, kiam ili bezonas ilin? Homo, kiu ne estas membro de UEA, povas ja cetere akiri ĝiajn kajerojn nur prunte. Eldonejo, kiu kolektus ĉiujn tiajn fakterminarojn kaj fakvortajn listojn kaj eldonus ilin libroforme, eventuale post ioma revizado, farus treege utilan servon al la praktika uzado de esperanto.

S. Engholm.

C. Marshall Hattersley: Maŝinoj, mono kaj paco.
Prezo 2 ŝ. aŭ 8 rpk.
Eldonis: The Social Credit Coordinating Centre,
Gordon House, Carrington Street, Nottingham,
Anglujo.

MR ĝis nun ne trovis kunlaboranton en socia ekonomio, kaj mia propra scio en tiu kampo estas tre limigita kaj supraĵa. Tial MR bedaŭrinde ne povas prezenti recenzon sur ekonomiscienca bazo de la supre nomita libro. Ĉar ĝi estas donita por recenzo, mi tamen provas doni almenaŭ kelkajn ĝeneralaĵajn vidpunktojn pri ĝia enhavo.

La ĉefpunktoj en la prezentado ŝajnas al mi esti: La produktadkapablo en la nuna industria socio estas tre granda. La pli multaj homoj havas tro malmulte da mono por povi aĉeti tion, kion oni produktas (kaj oni povus facile produkti multe pli). Por forigi mizeron kaj krei bonstaton aŭ almenaŭ kontentigan materian staton al ĉiu, oni devas reguligi la monkvanton tiel, ke ĝi respondas al la tuta ekzistanta aŭ produktebla varkvanto kaj juste dividi tiun laŭprovizan aĉetpovon al ĉiuj socioj. Tio estu farata per rekta mondistribuo al la socioj aŭ per malaltigitaj prezoj, sub la produktadkosto. En tiu lasta kazo la vendantoj ricevu de la nacia monprovizo la diferencon inter la subkosta vendoprezo kaj la efektiva varvaloro en la

vendmomento (simile al diverslandaj ŝtataj subvencioj al industrioj kaj terkulturo).

"... la eldonado kaj revoko de mono devas esti aĝustigita aŭtomate al la bezonoj de la popolo rilate al ĝia produktado kaj distribuado de varoj kaj servoj." — Tiuj prizorgoj pri la mono apartenu al iu nacia kreditodepartemento, kiu "devos esti sendependa aro de spertuloj, tute libera de politika influo aŭ rego".

Tia estas la programo, se mi ĝuste komprenis, kompreneble tamen nur en ĉefaj kaj proksimumaj trajtoj.

"La loganto kiu iom defie ekkrias: 'Kiel vi realigos viajn ideojn?' evidente supozas, ke pri tiu afero li mem ne havas personan respondecon. Tamen la respondo ja estas ĉe li. Kiam sufiĉe granda nombro da homoj entuziasme estos jam konvinkita pri la dezirinda, la praktikebla, kaj la morala pravo de la socikreditaj ideoj, Socikredito tuj fariĝos afero de praktika politiko." — La senco de tio ŝajne estas, ke oni propagandu la socikreditan programon ĝis jam ekzistantaj partioj aŭ nova socikredita partio leĝigos la sistemon per parlamentaj decidoj.

Ŝajnas al mi, ke la socikreditanoj — almenaŭ la aŭtoro de tiu ĉi libro — tro emfazas sian doktrinon kiel perfektan universalrimedon, kiel vojon al revata feliĉoregno. Se homoj misuzas aŭ fiuzas sian potencon en kapitalismaj, liberalismaj kaj komunismaj socioj, ili certe povas tion fari ankaŭ en socikredita socio.

La aŭtoro ofte parolas pri abundo. Ĉu oni havas rajton paroli pri abundo, kiam minimume du trionoj, eble eĉ tri kvaronoj, de la homaro vivas sub la nutraĵminimumo kaj same malmulte aŭ tute ne povas kontentigi aliajn materiajn kaj spiritaĵajn bezonojn? Ke oni en iuj lokoj en la mondo havas nevendeblajn provizojn de varoj kaj eĉ devas detrui ilin, estas afero bedaŭrinda rilate kaj al konsumantoj kaj al produktantoj, kaj tia sistemo estas ŝanĝinda. Sed el tiaj faktoj oni ne rajtas konkludi pri abundo rilate al la tuta homaro. Se oni juste dividus al ĉiuj homoj ĉiujn troajn kaj nevendeblajn stokojn en la mondo, la kresko de ĝenerala bonstato estus eĉ ne rimarkebla. Kaj traktante serioze la problemojn de la nuno estas prudente uzi la eblajn rimedojn de la nuno kaj lasi al la estonto la bonvenajn

sed ankoraŭ hipotezajn dividendojn de senfinaj energiprovizoj kaj mirakla nutrajproduktado.

"En la hodiaŭa tempo ne ekzistas ia rilato inter tio, kion industria komunumo povas produkti kaj tio, kion la sama komunumo povas aĉeti." — "Ĉu vi ne sentas, kiel li (la aŭtoro) ja sentas, ke sen enkonduko de la principoj de Socikredito en niajn ekonomiajn aranĝojn, restas neniam espero por nia civilizo?" — Tiaj frazoj ŝajnas al mi tro emfazaj.

La socikrediton celadon al pli justa kaj pli bone organizita distribuado ĉiu povas aprobi. Pri la rimedoj ekzistas kaj ekzistos diversaj konceptoj kaj opinioj. Ĝis nun limigitaj, praktikobazitaj plibonigoj montriĝis pli efikaj ol universalrimedoj.

Se tiu libro troigas la gravecon de sistemo, ĝi tamen donas valoran pensinstigon. En la nuna sociekonomia sistemo, precipe en la kampo de mono, troviĝas faktoroj kaj okazadoj, kiuj malutilas al ĉiuj, plej al la senhavuloj. Se oni ne komprenas tiajn faktorojn kaj okazadojn kaj laboras por forigi ilin, la malbono restas malgraŭ armeoj da persone idealismaj kaj justaj homoj. Estas necesa ankaŭ racia realigo de la idealismo.

La lingvo en la libro estas bona escepte kelkajn nebonajn vortuzojn. "Potenco" anstataŭ "energio" (industria) estas erariga. "Komunumo" en la senco de "socio" estas ebla, sed laŭ mia impresio ĝi nuntempe estas uzata preskaŭ ekskluzive por administra distrikto.

S. Engholm.

Kie oni malhelpas esperanton

El kopio de Orientgermana registara letero al "Unuiĝo de homoj persekutitaj de la naciŝocialista reĝimo", 4. 11. 1949:

"La esperantomovado kiel grupo por artefarita lingvo estas nuligita laŭ la dekreto de 12. 1. 49 kaj la aldona dekreto de 19. 7. 49. Estas fakto, ke kontraŭuloj al nia demokratio provas ĝeni niajn laborojn per helpo de esperantogrupoj.

Per gazetoj aperantaj eksterlande kaj per tiel nomata inter-

nacia societo kun sidejo en München oni provas sub preteksto de kultura neceso gajni anojn, per kies helpo oni volas malbonfamigi nian demokratian ordon."

Tia sinteno estas komprenebla en lando kun stalinisma reĝimo. Laŭ ĝia ideologio ĉiuj, kiuj ne estas stalinismaj komunistoj, estas iliaj malamiko kaj batalas por kapitalismo kaj imperiismo. Do estas nur konsekvence, ke oni malhelpas ilian agadon.

Iam ni alilandaj esperantistoj havis multe da amikoj en Rusujo, ankaŭ dum longa tempo de komunisma reĝimo, kaj ili havis same multe da amikoj en aliaj landoj. Per reciproka informado kaj instruado estiĝis reciproka kompreno, ŝato, interfratiĝo. La pluan kreskon de tiuj interkompreno kaj interfratiĝo oni ĉesigis per malhelpado al koresponda rilato inter sovetianoj kaj alilandanoj. Ni bedaŭras tion, kvankam ni povas kompreni la konduton, se oni rigardas nin kiel malamikojn.

Antaŭ mi kuŝas ankaŭ kopio de portugala oficiala polica akto, laŭ kiu sro. Saldanha Carreira estis informata ke "ne estas permesitaj iuj ajn aktivaj aŭ presajoj esperantistaj" kaj "ne estas permesita la instruado de esperanto en la lando".

Antaŭ ĉ. unu jaro oni sur Kanariaj insuloj (Hispanujo) malpermesis esperantoinstruadon ĉe la universitato de La Laguna, kaj unu profesoro — se la gazetaj informoj ne mensogas — estis forigata de sia ofico pro okupiĝo pri esperanto.

Kion mi supre diris pri la iamaj rilatoj inter rusaj kaj alilandaj esperantistoj validas ankaŭ por la rilatoj inter portugala kaj hispanaj esperantistoj kaj alilandaj. Ni esperantistoj en la tuta cetera mondo atestas, ke per la interrilato kun esperantistoj en tiuj landoj ni lernis pli multe pli Portugalujo kaj Hispanujo ol per iu ajn alia rimedo. La tiulandaj esperantistoj instruis nin per leteroj, per gazetartikoloj, per libroj, per siaj propraj vortoj dum niaj kunestoj. Estiĝis viva konatiĝo, estiĝis kompreno, ŝato kaj admiro por iliaj kulturoj. Tiuj esperantistoj faris grandegan servon kaj al ni kaj al siaj landoj kaj popoloj, kreante reciprokan ŝaton kaj interfratiĝon.

En tiu ĉi revuo kaj en multaj aliaj sro Rêgulo Pérez, docento ĉe la universitato en La Laguna aperigis multe da valoraj artikoloj pri Kanariaj Insuloj kaj pri hispana kulturo. Mi estas

certa, ke neniuj aliaj homoj kaj neniuj alia lingvo tiom kontribuis por doni al alilandanoj scion pri Kanariaj insuloj kaj vekis simpatian al ĝiaj homoj kaj ĝia kulturo.

Kial la aŭtoritatoj en tiuj landoj malgraŭ tio traktas la esperantistojn kaj esperanton en la menciita maniero? Ĉu oni havas la saman ideologion kiel en landoj de sovetia komunismo? Tiuokaze ni komprenas, ke temas pri konsekvenca konduto, sed ni bedaŭras, ke oni malebligas al ni vivan kontakton kun tiuj landoj kaj iliaj homoj, malebligas pluan kreskon de reciproka interkompreno kaj amikeco. Aŭ ĉu dependas de miskoncepto? Tiuokaze ni esperantistoj en la tuta mondo kun ĝojo donos al vi senfinan nombron da atestoj, kiuj komprenigos al vi pli bone la sencon de esperanto kaj la esperantista laboro.

S. Engholm.

Poemoj

De L. C. Deij

MIRAKLOSENTO

Hieraŭ en la ombro de militmemoro
mi ne toleris, ke la suno brulu,
ke super korakuzaj tomboj birdoj trilu
kun pli ol doloriga kantfervoro.

Printempas nun ĉe ni; la ruĝgorguloj kovas,
kaj kiel neĝfloreto el glacio
el mia apati' min liberigas io;
mi volus krei ĝin, sed mi ne povas.

Ĉu la sopirovibro de vesperkvieto,
la vivaltiga ardo de l'purpuro,
aŭ ĉu la sentokreo de folisusuro,
la emocia simpla de birdeto?

Atestu miaj larmoj kaj respektsilento
— ĉar miaj versoj estas nur formuloj —:
Ankoraŭ ni homiĝas kiel pratempuloj
pro la tensio de miraklovento!

PENSOJ

Pensoj, vi povas flugi trans limoj
teraj kaj tempaj — al stelmalproksimoj
kaj ravomondo! Kial la miaj
ŝvebas apenaŭ super la ŝlimoj?

Pensoj, vi povas aglon egali,
se vi persistas daŭre batali!
Kiu ne penas per la flugiloj
— hom' kiel birdo — devas ja fali.

KONTRASTO

Foje mi sentas surdan silenton,
kvazaŭ ekstere ĉio forpasis,
kvazaŭ la vivo min preterlasis;
tiam l' interno diras: Momenton!

Kion signifas tia prokrasto?
Vidi min mem kaj vidi kompare
kia mi devus esti — amare
senti: ankoraŭ granda kontrasto ...

TAMEN

La granda penso pri mondkolektivo
aperas al mi tro impona;
maturiĝante al pli plena vivo
mi trovas la simplan plej bona.

Sed kiam mi admiras etan guton,
pri mondocan' mi konscias,
kaj rigardante polvan lumoludon
de sun' la abundon envias.

LITERATURA MONDO informas siajn abonantojn, ke pro financaj malhelpoj la aperigo de la revuo ne plu estas ebla.

En la jaro 1949 ni sukcesis aperigi kvar numerojn kaj ni restis ŝuldataj al niaj abonantoj por du numeroj.

Kvankam ni ne sukcesis enkasigi eĉ la preskostojn de la kvar numeroj ni disponis ĉe niaj reprezentantoj, ke ili pagu al la abonantoj la trionon de la jara abonsumo pagita, se la abonantoj tion petas de nia reprezentanto, al kiu slatempe li pagis la abonsumon.

Literatura Mondo.

KOREKTOJ por nro 4/49: p. 11, l. 9 "similajn direktojn" — "similaj direktoj"; p. 27, l. 9 "dekoj de —" "dekoj da"; p. 27, l. 1 sub Literaturo "volumo I" — "volumo II"; p. 31, l. 6 "uzatajn akuzativojn" — "uzataj akuzativoj".

Se vi trovas Malgrandan Revuon rekomendinda — rekomendu ĝin! Ĉi de nun aperas ĉiun duan monaton. Se vi sukcesos havigi du cent novajn abonantojn, ĉiu numero povos enhavi 48 paĝojn anstataŭ la nunajn 32.